GISTO, Nov.2009.
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
Redaktis ottovaske@ibest.com.br
Donace por VK-ĉeestantoj.
Krom foraj loĝantoj, R$ 1,00

ESPERANTO ESTU ĈIE AŬDATA

Laŭ nia veterana italido Sangineti oni devas multe bruadi. Ĉi tion ni lastatempe tute neglektis. La gaŭĉa E-movado troe kaŝas nian idealon. Ĉu bezone ofte memorigi la popoldiron "tio kion oreloj/okuloj ne sentas, tio ne atingas la koron, la vigligan centron de homo. Bonŝance Skajpo bone taŭgas, ne nur por babilado pri kukurboj. Kun Karesema ni priparolis la aferon, ke nia VK iras sur ĝusta vojo kaj, kvankam TUTY'S estas sufiĉe altnivela, pokaj klientoj tie restadas en la sama horo. Tial malmultaj ne-samideanoj ne rimarkas niajn gajajn kunrestadojn. La iniciaton Verda Tagmanĝo mi aplaŭdis, domaĝe la manĝoj ne longan tempon okazis. Aliflanke mi kontraŭstaris GEA-kunsidojn en publikaj ejoj. Plurfoje mi ensendis al tiutempa GEA-estraro sugestojn ke niaj renkontiĝoj okazu en vasta publika manĝejo, dum oportuna horo. Neniam mi ricevis reagon. Aldone mi citas, ke mi sentis min (pro tio, forgesita en fridujo, same kiam mi proponis min gvidi lego/redaktan kunsidon). – Nun ĉe freŝa GEA-estraro kun, laŭ mi, tre bonvolema prezidanto, mi riskas reveki la arkivitan ideon: kunsidi prefere en restoracio kaj teni la sidejon (dum eblos) por akcepti gravajn vizitontojn, teni kursojn,bibliotekon, ktp.) – Ni du, Karesema kaj mi interŝanĝis ideojn kaj revas pri tiamaniere fari nian verdan bruadon.

- Opinias Karesema:

Miaopinie estas dum la "Verda Kafo"-kunsidoj kiam ni esperantistoj de la gaŭĉa movado, havas la eblon plej efike veki atenton kaj reagon de homoj, kiuj ankoraŭ neniam aŭdis pri Esperanto aŭ al kiuj Esperanto estas rigardata kun simpatio. Ĉar se oni vere volas montri kiel bele kaj efike funciadas Esperanton, oni devas uzi ĝin ĉiumaniere kaj ĉiumomente. Tielmaniere apenaŭ proponi al la homoj, ke ili lernu Esperanto-n ne sufiĉas...ni agu pli kaj plie, ni uzu la lingvon ĉie...(surstrate, en restoracio, en nia klubo, en la interreto). Ni montru kiel perfekte Esperanto celas grandskalan homakomunikiĝon. Ni aŭdigu Esperanton elegante, fiere, entuziasme. Ni kreskigu nian rondon sen bagateli, ni konvinku la homojn pri la utileco de Esperanto. Do nepre ni parolu en Esperanto!

Mi estas certa, ke ju pli da favoraj oportunoj por paroli en Esperanto, des pli pozitive al sukcesa propagando. Por konfirmi tion, mi rakontas okazaĵon – Dimanĉe mi kaj Irmina (pola amikino, kiu estis ĉe mi) promenadis en granda parko kun amaso da homoj trairintaj de unu direkto al alia. Ni du, ĝoje paroladis esperante, kiam subite homo venis al nia direkto kaj demandis per kiu lingvo ni konversasiadis. Ni haltis minutojn kaj ni faris propagandon pri nia lingvo. Li ege montriĝis entuziasma, gratulis al ni pro la belsona lingvo kaj demandis kie trovi pliajn informojn. – Mi kaj Irmina krevis de ĝojo... li certe estis unusola homo, kiu havis kuraĝon por denandi sed nia entuziasma parolado atentigis multajn. Kaj por mi kaj por ŝi estis ege pozitiva tago. – Karesema/Verdkore.

ANTAŬEN, KARULOJ!

FASTI BONFARTIGAS !

MEMORAĴO

Popoldiro asertas ke, kiam oni ofte rememoras okazintaĵojn de sia vivo, tio signifas ke oni antaŭzorgu pri loĝejo en urbo de forpasintuloj. Jes, ja mi pere de Gisto rakontas kelkajn faktojn kiuj, laŭ mi estas spritaj mencioj far gekolegoj el mia flugista vivo.

"Elsakigi batatojn" estas ĉarma kompara diraĵo far la dua piloto Ŝavier. Jen motivo demandi: ĉu la leganto scias la diferencon inter batatoj kaj terpomoj? Nu, batato estas la dolĉa specio. Kaj do, nia amiko Ŝavier estis amazonano, tre sociema kaj tre kara inter ni skipanoj, multjara radiotelegrafisto sur ŝipoj antaŭ ol li fariĝis flugisto ĉe Kruzejro do Sul. Tiutempe fraŭlo, li posedis en RIO etan apartamenton kiun li okupis kune kun amika kolego ankaŭ maristo. Sciatas ke tiaj profesiuloj, kiam ekveturas ofte restadas elhejme sinsekvaj 3 aŭ 4 monatojn. Tial okazis ankaŭ ke ofte unu ne renkontis la alian dum ses monatoj. Tiam li, responsa pri la apartamentaj lupagoj, akvo, elektro, ktp. Devis lasi skribitan noton: fuŝulo X, ne forgesu denove, postlasi monon por pagi niajn fakturojn... tamen, malgraŭ tio la ulo estis honesta.

Iam okazis ke nia amiko Ŝavier revenis post longa vojaĝo, eniris sian loĝejon, ne trovis sian kunulon sed sentis, pro la odoro, ke li estas ne sola en sia hejmo. Baldaŭ li vidis inajn ŝuojn kaj konstatis ke iu sin duŝas. Li elpakis aĵojn, inter kiuj botelon da viskio kiujn li kunportis el aliaj landoj.

Iom poste aperis la juna ino kiu finbanis sin. Ŝi, iomete ĝenata pardonpetis pro sia "invado" kaj klarigis al Ŝavier, ke lia amiko X permesis ŝin restadi du semajnojn en tiu apartamento, ĝis ŝi povis havigi al si novan loĝejon. Ili konversaciis kaj baldaŭ li sciiĝis ke ŝi kaj X havis delonge amikajn rilatojn sed estis ne geedzoj. Li esploris pli pri ŝia vivo kaj sciiĝis ke ŝi laboras kiel dancistino en kabareto Lido. Ili rilatiĝis kiel bonaj amikoj. Karenca viro eluzas ĉiujn ŝancojn kiujn la vivo prezentas al li. Ŝi ne havis edzinan kompromison do li avancigis sian seksdeziron kaj ŝi ne refutis. Baldaŭ ambaŭ estis en lia lito kaj li okupiĝis per la tasko depreni ŝian longan pantalonon. Li rakontadis: ŝi kuŝis kaj mi firme kaj alte tenis ambaŭ ŝiajn krurojn per la pantalontuboj. Mi iomete skuis, same kiel oni faras por elsakigi batatojn. Elglitis la bela virina figuro kaj mi devis nur senŝeligi ŝin el la ceteraj vestaĵoj kaj frandi belan junulino - Poste, dum labortempo, kiam oni preterpasis lin, por rememorigi la etoson oni kvazaŭ saluto kutimis ripeti laŭ lia dirmaniero "elsakigi batatojn!".

Bonhumora anguleto.

MISKOMPRENO

Motorciklisto je 150 Km/h, sur ŝoseo. Antaŭ li aperis birdeto senŝanco por devojiĝi kaj kunfrapiĝis: "PUF!!".
Per la retrospegulo la veturanto ankoraŭ povis vidi la povran besteton turniĝi multfoje, ĝis ĝi kuŝis senmova.
Medipretekta konscienco riproĉis lin. Li revenis por helpi la besteton. Ĝi estis senkonscia, preskaŭ mortinta. Afliktita la motokisto levis la birdeton kaj portis ĝin al kuracejo kie oni savis ĝian vivon. La savinto aĉetis kaĝon, enmetis la birdeton kaj portis ĝin al sia hejmo. Zorge li enmetis panpecon kaj plenan akvujeton.Sekvan tagon la animaleto vekiĝis plenkonscia kaj, vidante sin ĉirkaŭkradita kun panpeco kaj akvo en angulo, la besteto krucigis la flugilojn super sia kapo kaj vekriis maltrankvilege: "Dio mia! Mi mortigis la motorcikliston!!!

KULPAS LA LINGVO

Dum simpozio oni konstatis: japanoj mangas pokajn grasaĵojn kaj suferas malpli da koratakoj ol usonanoj kaj britoj. Francoj mangas grasaĵojn kaj havas malpli da koratakoj ol britoj/usonanoj. Italoj trinkas multan vinon kaj havas malpli da koratakoj ol britoj/usonanoj. Konklude: mangu kaj trinku kiun ajn vi volas. Kio mortigas estas paroli angle!